

& Vi resaniĝis!:

< Rekante 21 el 49 batoj por strofo, entute 294 paŝoj dum 4 minutoj. Verkis Raymond Schwartz (La stranga butiko, 1931) kun dediĉo: Al mia bona amiko, Jan Kostecki. Baladigis Martin Strid (2016) per novaj melodio kaj rekantaĵo.>

(#Melodio:

<:49> (

/(La LaTi domi mire re; Ti Tido refa fami mi; do miTi do La;)×2

(#Rekantaĵe: mi (lala lala lala mi; re remi fala mi;)×2 do miTi do La)

)×5)+

(&Strofoj:

'1 /Mi ĵus konstatis, kara Jan, ; Ke reprosperas via san' ; Samkiel kverko; Sen febro nun kaj sen kolik' ; Vi floras kiel florbrasik ; En grasa sterko!

(×:; **Se akvo fluas tra la gorĝ' ; vi malsaniĝos tuj ; Estu nepre via zorg' ; alkohol' en la uj' ; se akvo fluas.**)

'2 Sed kio resanigis vin? ; Ĉu talisman', ĉu medicin'? ; Ĉu pentofaro? ; Ha, kia ŝerc', – mi scias, ke ; Eĉ ne sukcesis helpo de ; ..Veterinaro!

'3 Mi longe pensis pri la kaŭz' ; De via kontraŭviva naŭz' ; Kaj min konvinkis ; La fakto, ke vi febris nur, ; Ĉar peke kontraŭ la natur' ; Vi.. akvon trinkis!
.....

'4 Ĉu vi memoras? – Jes, ĉe mi ; Vi tiel tede petis pri ; Freŝ-akva guto, ; Ke mi konsentis pro la pac', ; Kaj vi.. ĝin trinkis sen grimac' ; Samkiel bruto!

'5 Kunkulpa en la krima far' ; Mi pente pensis pri ripar' ; De ĉi blasfemo. ; Mi lavis ĝin per ruĝa vin', ; Kaj tio ŝajne savis vin ; De l' anatemo,

'6 Ĉar min trinkadis, kara Jan, ; Ĝis tia grad' je via san' ; Kaj malpereo, ; Ke sufiĉegus ĝi por re- ; ..laksigi regimenton de ; La Sav-Armeo!